Universala Esperanto-Asocio

EKO
UKO

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko: EKO 2015-31 sendita el Lillo, la 28an de julio.  EKO-UKO numero 4*

# Ĉiu mondangulo vidigis sin ene de dudek kvin minutoj

La salutoj de Landaj Reprezentantoj estas ĉiam populara parto de inaŭguroj de Universala kongreso. Ĉi-jare tiu prezento estis aparte bunta, kun  rekorda nombro da landoj. La fotoj en la PDF-versio provas komuniki tiun vario. Komence de la salutado, la gvidantoj (estraranoj José Anotonio Vergara kaj Lee Jungkee) invitis kongresanojn stariĝi laŭkontinente. Tio atestis la signifajn ŝanĝojn en nia monda demografio, kiuj efektive rezultas en vera tutmondigo en la elekto de kongresurboj.









